

# ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando

Esperantobladet

Joulukuu ♦ Decembro

6/1998

*Bonan Kristnaskon  
kaj  
Feliĉan novan jaron  
1999*



*D-ino Aira Kankkunen prelegis  
en Turku-a librofiro (p. 16).*



*Martin Wiese & gitaro en akustika  
koncerto de Persone (p. 20).*

## **Esperanto:**

- uusi sanakirja, s. 4**
- PMEG & Bertilo  
Wennergren, p. 8**

## **La romano**

**"Durankulak",**

**p. 11**

# Esperantolehti

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk tidskrift. Organ för Finlands Esperantoförbund.

Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

**Toimitus/Redaktion/Redaktejo:** *Aimo Rantanen*

PL 2, 40801 Vaajakoski. ☎ (014) 261 438 ✉ aimo.rantanen@pp.inet.fi

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Tollinpolku 1 B 21, 00410 Helsinki. ☎ (09) 530 1804 ✉ ilkka.santtila@icl.fi

WWW-sivujen taitto/ Enpaĝigo de TTT-paĝoj: *Matti Lahtinen*

Syrjälänkatu 6 B 61, 40700 Jyväskylä. ☎ (014) 615 054 ✉ matlah@sci.fi

**Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo:** 80 mk/vuosi/år/jaro;

Jäsenille/ För medlemmar/ Por membroj: 60 mk; Baltio 60 mk, aliaj landoj 80 mk.

**Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adressanĝoj:**

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmögatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Postisiirtotili/Postgirokonto/Poŝtĝirkonto: 800017-230825.

Julkaisija/utgivare/eldonanto: Suomen Esperantoliitto – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Eldonkvanto: 500

## Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

<http://www.sci.fi/~matlah/eaf/>

**Prezidanto/Puheenjohtaja:** *Jukka Laaksonen*

Uudenkylänkuja 2 B 11, 33530 Tampere. ☎ (03) 255 4724; työ/laboro: (03) 249 4313

**Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja:** *Jukka Pietiläinen*

Nyyrikintie 4 H 47, 33540 Tampere. ☎ (03) 261 7871 ✉ tijupie@uta.fi

**Sekretario/Sihtööri:** *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

**Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet:**

*Anna-Liisa Ali-Simola*, Friskinkatu 2 A 33, 20360 Turku. ☎ (02) 238 7767

*Kimmo Hakala*, 72300 Vesanto. ☎ (017) 648 831 ✉ khakalat@nettilinja.fi

*Seija Kettunen*, Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ (014) 254 609

*Tuula Virolainen*, Auringonkatu 8 E 48, 02210 Espoo. ☎ (09) 803 6149 ✉ tuula.virolainen@vtt.fi

**Vicestraranoj/Varajäsenet:**

*Jussi Jäntti*, Retkeilijäntie 5 B 14, 70200 Kuopio. ☎ (049) 859 641

*Markku Saastamoinen*, Siukolantie 9 H 12, 33470 Ylöjärvi. ☎ (03) 348 4245

*Ritva Sabelli*, Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 635 902 ✉ ritva.sabelli@sfs.fi

**Rahastonhoitaja/Kasisto:** *Antti Mikkola*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ antti.mikkola@orion.fi

Postisiirtotili/Poŝtĝirkonto: 800017-230825.

**Toimisto/Oficejo:** Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.

☎ (09) 715 538 (puh.vastaaaja/automata respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

**UEA:n pääedustaja / Ĉefdelegito de UEA:** *Heta Kesälä*

Kalamiehenkuja 3 D 32, 04300 Tuusula. ☎✉ (09) 275 5528

Postisiirtotili/Poŝtĝirkonto: 800029-19438647 (maksut UEA:lle/ pagoj por UEA).

## Senriska praktika internacia kunlaboro?

Mi reklamis al unu konato de mi Esperanton tiel, ke ĝi ebligas ankaŭ sur malalta lingvoscio praktikan internacian kunlaboron. Esperanto estas la lingvo de paco. Sed pacamo kiel plej klara kaj profunda idealo povas kaŭzi tion, ke la pacamanto venas al konflikto kun la socio. Tiam sorton spertis Arndt Pekurinen (29.8.1905 – 5.11.1941), antimilitaristo kiu pro sia idealo estis ekzekutita dum la daŭriga milito. La idealo de Pekurinen estis tiel profunde konstruita en lia menso, ke li ne pro minaco esti prizonota aŭ sendota al frenezulejo rifuzis la idealon. Tio kaŭzis, ke dum li dum siaj 36 vivjaroj nur 8 jarojn kiel adolto ĝuis ordinaran civilan vivon ekster malliberujo.

Arndt Pekurinen estis sola kun sia idealo. Liaj antimilitarismaj samideanoj unu post alia iris al militservo kaj ne sekvis la solecan kaj suferplenan Kalvario-vojon de Pekurinen. Pekurinen rifuzis totale laboron, kiu povus servi la Finnan armeon. Tio estis sensacia konduto en la ĵus naskita Finna respubliko. Lex Pekurinen, kiu ebligis eksterarmean servon por rifuzintoj je militservo, estas nomumita laŭ Arndt Pekurinen. Albert Einstein kaj aliaj mondkonataj pacifistoj sendis leterojn por plibonigi la vivkondiĉojn de armilrifuzinto Pekurinen en malliberejo. Ministro pri ekster-

aj aferoj venis en ĝena situacio pro Pekurinen, ĉar li ne volis doni eksterlanden malbonan bildon pri ĵuraj kondiĉoj en Finnlando.

Tiel eksteren el la socio Arndt Pekurinen estis forpuŝita, ke nur pro interveno de du parlamentanoj la vidvino de Pekurinen ricevis rajton entombigi lian korpon. Tiam solecon de tiel nobla persono nuntempulo ne povas kompreni. Pro Rezolucio pri homaj rajtoj kaj internacia ĵuro la registaroj devas trakti siajn civitanojn konsiderinde klare. Sed ĉie en la mondo tiaj principoj ne estas perfekte obeitaj. Kaj tio kaŭzas, ke praktika internacia kunlaboro ne nepre ĉiam estas senriska. Kulturdiferencoj, kontraŭ eksterlandanoj suspektema konduto, lingvaj miskomprenoj kaŭzas ofte, ke pacema mesaĝo de alinaciulo estas miskomprenita. Mi pensas, ke Arndt Pekurinen ne estis tie aĉa kaj danĝera persono kiel lin priskribis liaj samtempuloj. Sed pri lia profunde kreskinta idealo ankaŭ ili povintus lerni ion valoran. Same kiel ni.

Fonto: Erno Paasilinna: Rohkeus. Arndt Pekurinen elämä ja teloitus. Otava. Keuruu 1998.

Trankvilan Kristnaskan tempon al ĉiu leganto kaj kunlaboranto de Esperantolehti.

*Aimo Rantanen*

## Grava jaro alproksimiĝas

Venontjare Finnlando estos pli ol kutime en la fokuso de la internacia gazetaro, ĉar dum la posta duono de la venonta jaro ĝi estos la prezidanta lando de Eŭropa Unio. Jam de la komenco de la jaro nia lando apartenos al tn. trojko de EU, kiu konsistas el funkciinta, funkcianta kaj funkcionta prezidantaj landoj. Ekde la komenco de la jaro ni klopodos al kutimiĝi al la nova eŭropa monunujo kaj en julio okazos elektoj de la Eŭropa parlamento. En Finnlando okazos elektoj de la parlamento kaj komunumaj deputitaroj. La venonta jaro estos krome la 150-a datrevena jaro de la plena Kalevala. Venontjare ankaŭ finiĝos la 1900-aj jaroj kaj post unu jaro la tuta mondo senpacience atendos, ĉu niaj milionoj da komputiloj freneziĝos kaj ĉesos funkcii.

### **Pri frenezeco**

Claude Piron menciis en sia citita parolado, ke en fruaj tempoj plejparto de esperantistoj estis neŭrotikuloj, psike malsanaj, kiuj tamen savis la movadon por vivi ankoraŭ. Ofte oni ankoraŭ ŝerce diras, ke postulas iom da frenezeco por esti esperantisto aŭ labori por tia afero. Mi persone ne povas nei tion, sed povas esti iom danĝere paroli pri frenezeco aŭ neŭrotiko, ĉar apartigitaj el la kunteksto tiaj diraĵoj povas esti uzataj ankaŭ kontraŭ ni. Kaj oni ja scias kiel volonte oni kaptas ĉiujn negativajn aferojn por povi moki iu(j)n. Kun bona konscio ni tamen povas diri, ke ekzistas centoj da diversaj movadoj, kies

membrojn oni povas moki frenezuloj. Inter ili estas ankaŭ movadoj, kies celoj estas universale agnoskitaj.

Frenezeco kaj fanatikeco estas ofte konsideritaj sinonimoj kaj fanatikeco estas ja eco de preskaŭ ĉiuj, kiuj batalas por iu certa afero. La eldiraĵo de Piron enhavas laŭ mia opinio tamen pli multe pozitivan ol negativan sencon, ĉar ĝi montras, ke la mondo bezonas homojn, kiuj ĝisoste kredas je sia afero kaj insistas malgraŭ moko pri frenezeco. Kiel multe oni siatempe mokis tiujn, kiuj kuraĝis plani aviadilon, vaporŝipon ktp? Kiam dum disputado pri la libro de Darwin episkopo Wilberforce moke demandis al Thomas Hüley ĉu li devenis de simio de patra aŭ patrina flanko, tiu diris, ke li pli volonte devenus ambaŭflanke de simio ol homo, kiu uzas sian talenton por aperigi miskredon en aferoj, pri kiuj li nenion scias.

Same mi volonte akceptus la nomon frenezulo, se tio kontentigas iun, sed ne volas pro tio forlasi Esperanton. La tasko de la esperantistoj estas frapadi ĉe la pordo de la homa kompreno ĝis ĝi estos preta por akcepti nian lingvon tia kia ĝi estas kaj utiligi ĝin tie, kie ĝi taŭgas.

Mi volas saluti ĉiun leganton de Esperantolehti dezirante bonan jarfinan festotempon kaj bonan sukceson en la jaro 1999.

*Jukka Laaksonen*

## Uusi sanakirja edistyy

Suomen Esperantoliiton aloitteesta laadittavan uuden suomalaisen esperantosanakirjan toimitustyö on lähtenyt hyvään alkuun. Sanakirjan päätoimittaja on Jouko Lindstedt. Toimituskunnan muut jäsenet ovat Riitta Hämäläinen, Matti Lahtinen, Harri Laine ja Raita Pyhälä. Heillä on tukena kansainvälinen neuvottelukunta, johon kuuluu Maailman Esperantoliiton hallituksen jäsen Kalle Kniivilä sekä EU:n kääntäjät Jorge Camacho ja Brian Moon.

Sanakirjan julkaisijasta ei ole vielä päätöstä, mutta luonnollisesti toivomme jonkin kaupallisen kustantamon kiinnostuvan asiasta. Mahdollisesta CD-ROM-versiosta ei myöskään ole keskusteltu, mutta oletettavissa on, että sanakirjan ilmestyessä ensi vuosikymmenen alussa laserlevy on tavallinen liite jokaisessa uudessa keskikokoisessa tai suuremmassa sanakirjassa. Kaikki sanakirjan aineisto on alusta asti tietokonemuotoista.

Työn alkuvaiheessa oli päätettävä sanakirjan koko ja suuntaisuus – suomi-esperanto, esperanto-suomi vai kaksisuuntainen sanakirja. Toimituskunta päätti laatia keskisuuren suomi-esperanto-sanakirjan. “Keskisuuri” tarkoittaa sanakirjojen maailmassa noin 50 000 hakusanaa, joten tekeillä on joka tapauksessa tähänastisista laajin suomi-esperanto-sanakirja. Muissa maissa viime aikoina ilmestyneistä sanakirjoista sekä kooltaan että esitystavaltaan parhaimpana mallina voi pitää Ebbe Vilborgin erinomaista ruotsi-esperanto-sanakirjaa, vaikka luonnollisesti muunkieliset sanakirjat antavat toimituskunnalle runsaasti hyviä ajatuksia.

Esperanto-suomi-sanakirjaa ei tässä vaiheessa pidetty yhtä tarpeellisena. Tähän oli monia syitä. Suomen Esperantoliiton myy-

mästä Vilkin ja Favénin kaksisuuntaisesta sanakirjasta on vielä painosta jäljellä, ja sen esperanto-suomi-osa on useimmiten riittävä sellaiselle käyttäjälle, joka ei vielä käytä yksikielistä sanakirjaa, siis erityisesti Plena Ilustrita Vortaroa (PIV). PIV:istä on sitä paitsi tulossa uusittu laitos, ja mahdollinen uusi esperanto-suomi sanakirja on järkevämpi laatia vasta sen ilmestyttyä. Ja kaksisuuntaisen sanakirjan tekeminen olisi myös sitonut niin paljon voimavaroja, ettei vielä kukaan olisi voitu kunnolla keskittyä nimenomaan suomenkielisen esperanton käyttäjän vaikeuksiin hänen etsiessään osuvaa esperanton sanaa tai sanontaa.

Kunnollisen suomi-esperanto-sanakirjan tulee auttaa suomalaista, kun hän miettii, mikä on paras käänös vaikkapa jonkin jouluruuan nimelle tai valtionhallinnon termille. Myös yleisimpien suomenkielisten sanontojen ja sananlaskujen tulee löytyä sanakirjasta. Siksi yleisimpien sanojen sanakirja-artikkeleissa esimerkkilauseet ovat yhtä tärkeitä kuin itse hakusanan käänös.

Esimerkiksi sopii vaikkapa suomen sana “leipoa”. Useimmat suomalaiset esperantosanakirjat kääntävät sen yksioikoisesti *baki*. Itse asiassa sanat eivät ollenkaan vastaa toisiaan! “Leipoa” tarkoittaa leipien, pullien tai kakkujen valmistamista taikinasta ja sen muotoilusta aina uunissa kypsentämiseen saakka, ja erityisesti se viittaa taikinasta muotoiluun leiviksi ennen niiden laittamista uuniin. *Baki* sen sijaan tarkoittaa “kypsentää uunissa”. “Leipoa leipää” on kyllä usein *baki panon*, koska yhtä valmistamisen osaa voi käyttää koko valmistusprosessin nimenä. Tarkempi käänös on kuitenkin *fari panon*. Ja “taikinasta leivotaan pöydällä pieniä pul-

lia” ei missään nimessä käänny *baki*-verbillä, vaan esimerkiksi verbeillä *formi* tai *knedi*. Toisaalta taas esperanton *baki*-verbiä voi käyttää sellaisissa yhteyksissä, johon suomen “leipoa” ei mitenkään sovi, esimerkiksi *baki brikojn* on “polttaa tiiliä”, *baki pomojn* on “tehdä uuniomenia”.

Toinen esimerkki voisi olla sana “epäillä”, joille sanakirjat ensimmäiseksi tarjoavat vastinetta *dubi*. *Dubi* tarkoittaa aina “epäillä jonkin todenperäisyyttä”. Jos siis suomalainen kääntää lauseen “epäilen, että suunnitelmaa ei voida toteuttaa” esperantoksi *mi dubas, ke oni ne povos realigi la planon*, hän tulee sanoneeksi aivan päinvastaisen ajatuksen kuin tarkoitti! Oikea käänнос käyttäisi verbiä *suspekti* tai *supozi* (tai jättäisi *ne*-sanan pois). *Supozi*-vastinetta sanakirjat eivät yleensä edes anna, vaikka suomen “epäillä” usein lähenee merkitykseltään juuri sitä. Tässäkin siis esimerkkilauseet auttaisivat asiaa.

Suomenkielisen esperanton käyttäjän lisäksi uusi sanakirja pyrkii palvelemaan myös

sellaisia muunkielisiä esperantisteja, jotka haluavat opiskella suomea. Tämän vuoksi hakusanoihin liitetään niiden taivutusta osoittava numero, ja selityksissä mainitaan joskus suomalaisille itsestään selviäkkin asioita. Valmista sanakirjaa voi siis myydä myös ulkomaille.

Sanakirjahankkeella on Internet-kotisivu osoitteessa

<http://www.helsinki.fi/~jslindst/vortaro.html>

Verkkosivuilta löytyy tarkka esitys sana-artikkelien laadintaperiaatteista sekä kokeeksi laatimani osuus O-kirjaimen alusta. Aivan ensimmäiset hakusanat O:n alusta ovat luetavissa myös tämän artikkelin liitteestä. Plusmerkki (+) sanan edessä osoittaa sanan kuuluvan etupäässä tieteelliseen tyyliin, %-merkki taas varoittaa sanan olevan muuten harvinaisen.

Jouko Lindstedt

<[jouko.lindstedt@helsinki.fi](mailto:jouko.lindstedt@helsinki.fi)>

### Koartikkeleita O-hakusanan alusta

**oas** 41\*D dorno.

**obduktio** 3 nekropsio.

**obeliski** 5 obelisko.

**objekti** 5 objekto.

**objektiiv** 5 objektivo.

**objektiviinen** 38 objektiva.

**obligaatio** 3 obligacio (valorpapero).

**obligatorinen** 38 deviga, nepr.

**oboe** 3 hobojo.

**observatorio** 3 observatorio.

**observoija** 10 observanto, observisto.

**obstruktio** 3 obstrukco.

**odelma** 10 postkreskaĵo (post fojnrikolto), postfojno.

**odontologia** 12 denta medicino, dentist-arto, %odontologio.

**odottaa** 53\*C 1. atendi, *odotan ystävääni* mi atendas (mian) amikon, *odotan sisällä, kunnes sade lakkaa* mi atendas endome ĝis ĉesos pluvi, mi atendas endome ke la pluvo ĉesu; (*ennakoida*) atendi, antaŭvidi, anticipi, *odotan sään huononevan* mi atendas/antaŭvidas ke la vetero malboniĝos, *osasin odottaa hänen reaktiotaan* mi antaŭvidis/anticipis ŝian reagon; (*toivoa*) atendi, esperi, *odotan simun tulevan juhliin* mi atendas/esperas ke vi venos al la festo, *häneltä odotetaan paljon de ŝi* oni atendas multon; *meitä odottaa kova urakka* nin atendas peza tasko, *Maria antoi meidän odottaa itseään* Maria lasis nin (longe) atendi (ŝin), Maria atendigis nin, *olla odotettavissa* esti atendebla, *odotapas!* (*uhkaus*) gardu vin! (minaco) 2. (*olla raskaana*) esti graveda, *odottava äiti* graveda virino.

# Esperanton opetuksesta

Opettajien kansainvälinen esperantoliitto ILEI sai uuden johtokunnan Montpellierissa. Sen jäsenille on jaettu vastuualueita, esim oppivälineet ja kirjat, talous, opettajien koulutus ja kurssitus, kielitutkinnot. Puheenjohtaja Mauro La Torre Rooman 3. yliopiston Kasvatustieteen laitokselta huolehtii tiedotuksesta sähköisillä sivuilla\*, joissa kerrotaan ILEIn osastojen toiminnasta ja saavutuksista jäsenmaissa ja tarjotaan ajankohtaista tietoa kaikille esperantoa opettaville. Sivut ovat esperanton näyteikkuna myös kasvatustieteen poliitikoille ja kielten oppimisesta kiinnostuneille. ILEIn sivuilta on linkkejä esperantokirjastoihin, tekstipankkeihin sekä muunkielisille kielten opetusta käsitteleville sivuille. Sinne otetaan mielellään vastaan lisäyksiä, korjauksia, uutisia ja ideoita.

## Kielipaja

ILEIn sivuille tulee myös kielipaja LIL (Lingva Laborejo), jossa esperantoa opettavat voivat kohentaa omaa kielitaitoaan. Sinne kerätään eritasoisia ja -muotoisia harjoituksia tekstin ymmärtämiseen, lauserakenteiden ja sanaston hallintaan. Näiden tekemiseen Mauro La Torre pyytää avoimesti apulaisia kaikista maista. Sivuilta saa myös tietoa es-

peranton opiskelijoille ja opettajille tarjolla olevista kilpailuista, tutkinnoista ja lehdistä. Siellä esitellään oppikirjoja ja muita oppivälineitä sekä kouluttautumismahdollisuuksia, ILEIn konferensseja ja seminaareja.

## Esperanton opetuksen laajuus maailmassa

La Torre on kerännyt ja ottaa jatkuvasti vastaan tietoja eriasteisista kouluista ja laitoksista, joissa esperantoa opetetaan tai joissa on yksikin esperantoa taitava opettaja. Koulut osoitteineen löytyvät ILEIn uusilta sivuilta. Lisäksi siellä on tietoja meneillään olevista kansainvälisistä opetus- ja kulttuuri-ohjelmista, joissa käytetään esperantoa tai joiden tarkoitus on opettaa juuri sitä ja auttaa oppilaita saamaan kansainvälisiä yhteyksiä sen avulla. Tällaisia hankkeita ovat esim. Interkulturo, Ekparoli, ESP2, Mondo-rondo, KKST ja Fundapax.

*Suomentanut Raita Pyhälä  
Suomen ILEI-osaston ELFIn pj.*

*\* Jos voit käyttää Internetiä vaikkapa kirjastossa, niin katso ILEIn sivustoa osoitteesta <<http://www.uniroma3.it.lps/esp/ilei>>.*

**odottamatta** neatendite.

**odotuksen|mukainen** 38 atendebla, antaüvidebla.

**odotuksen|vastainen** 38 neatendebla, neantaüvidebla.

**odotus** 39 1. (*odottaminen*) atend(ad)o; (*toive*) atendo, espero, *häneen kohdistuu suuria odotuksia* de li oni atendas multon, *vastata odotuksia* plenumi la atendon/esperon 2. (*raskaus*) (tempo de) gravedeco.

**odotus|aika** 1. atendotempo 2. tempo/longeco de gravedeco.

**odotus|arvo** antaüvidebla (ekonomia) valoro (precipe de arbaro); (*tilastotieteessä*) atendebla mez(o)-nombro/mezvaloro, +ekspekto.

**odotus|huone** atendejo.

## Intervjuo de Bertilo Wennergren

Al la demando “kio estas la plej bona gramatiko de Esperanto?” pli kaj pli multaj uzantoj de Esperanto komencis respondi: “Kompreneble Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko, verkita de Bertilo Wennergren.” “Ĉu de tiu rokbandano?” – demandas iu. Ĝuste li! La Plena Manlibro, aŭ mallonge PMEG, estis ĝis nun konsultebla nur en Interreto, en bonega hiperteksta vesto trov-



ebla ĉe: “<http://purl.oclc.org/NET/pmeg>”. Kiam Bertilo vizitis Helsinkon fine de novembro por koncerti kun la ceteraj membroj de la bando “Persone”, mi demandis lin pri la eventuala libra eldono de PMEG kaj kelkaj gramatikaj aferoj.

JL: Kia estas la historio de PMEG? De kie venis la ideo?

BW: Mi verkis antaŭ longa tempo malgrandan kompendion de Esperanta gramatiko por svedoj. Poste Jorge Camacho kaj interalie ankaŭ Osmo Buller kuraĝigis min verki pli ampleksan version. Stellan Lagerström ebligis por mi enretigi ĝin en hiperteksta formo; li estis grava homo por tiu afero.

JL: Ĉu la Manlibro baldaŭ aperos kiel vera libro?

BW: Ĝi estas jam kompostata, kaj mi esperas, ke UEA eldonos ĝin. Sed ĝia longa ek-

zisto en TTT ne estis perdita tempo: mi sentas min multe pli sekura pri pluraj punktoj nun, ricevinte komentojn kaj proponojn de la TTT-uzantoj.

JL: Ĉu la reta versio estas tamen plu modifata?

BW: Ne multe, ĝi estas nun pli-malpli definitiva. Sed ankoraŭ mi trovas etajn erarojn, kiujn mi korektas.

JL: Ĉu ne ĉio necesa jam troviĝas en Plena

Analiza Gramatiko de Esperanto?

BW: Tute ne. Ankaŭ en mia gramatiko ne troviĝas ĉio. Sed Plena Analiza Gramatiko ekzemple nur supraĵe pritraktas la uzon de la I-verbo (infinitivo): kie en la frazo oni povas uzi ĝin kaj kio estas ĝia subjekto laŭ la signifo. Estas multaj interesaj punktoj ne priskribitaj en iu ajn alia gramatiko antaŭ la Plena Manlibro.

JL: En la Manlibro vi uzas novajn, pli simplajn terminojn pri gramatikaj kategorioj – vi ekzemple parolas pri “O-vorto”, ne pri “substantivo”. Ĉu oni kritikis vin pro tio?

BW: Mi timis, ke oni min kritikos. Sed estis tute inverse. Homoj simple akceptis la terminojn, kelkaj eĉ laŭdis min pro ili. La Esperanta mondo ĉiam surprizas min.

JL: Kion vi faras al Esperanto per via gramatiko – ĉu vi influas ĝin, aŭ nur priskribas?



BW: Baze mi priskribas, sed ankaŭ esperas influi. Mi klarigas tion, kio estas. Mi deziras se eble reguligi la lingvon tie, kie estas kaoso, sed ne vere ŝanĝi ĝin.

JL: Multaj certe trovas vian gramatikon sufiĉe konservema...

BW: Ĝi estas. Estas tasko de tiu libro. Mi ne diras, ke evoluo kaj ŝanĝiĝo ne rajtas okazi, sed ĝi ne okazu pere de proponoj en gramatika libro. Mi pensas, ke lingvo estas delikata mekanismo, ke ĉiuj ĝiaj partoj interdependas. Se oni ŝanĝas unu parton, ankaŭ aliaj partoj estas tuŝataj. Tial ŝanĝo, kiu estas prudenta en unu parto, povas montriĝi ege malprudenta, kiam la lingvo komencas ŝanĝiĝi en alia loko pro tiu unua ŝanĝo. Estas kiel domo el kartoj, kiu povas tute disfali, se oni tuŝas unu karton.

JL: Ĉu en Esperanto do regas interna ekvilibro?

BW: Nu, neniu lingvo havas internan ekvilibron. Unu el la kaŭzoj de la ŝanĝiĝo de la lingvo estas, ke ĝi strebas al interna harmonio kaj ekvilibro, sed tiu neniam estas ebla. Harmoniigo en unu loko kaŭzas malharmoniiĝon en alia. Sed multaj kaŭzoj de la ŝanĝiĝo estas mistero tiom por mi kiom por aliaj.

JL: Plena Ilustrita Vortaro kaj gramatikoj verkitaj de individuoj fakte influas Esperanton pli multe ol Akademio de Esperanto. Ĉu tio estas bona evoluo?

BW: Mi kredas, ke individuoj ĉiam influis Esperanton pli multe ol la Akademio. La Akademio oficialigis vortojn, kaj tiuj eniris en vortarojn, sed alie ĝi ne multe influis la lingvon. Ankaŭ la rolo de la oficialigo ne plu estas tia, kiel antaŭe. La oka Oficiala Aldono havis nenian praktikan signifon.

JL: Vi ne estas membro de la Akademio, sed vi enretigis kelkajn el ĝiaj bazaj dokumentoj kaj konas ilin tre bone. Ĉu vi aliĝas al tiuj, kiuj kritikas la Akademion pro nefunkciado?

BW: Miaj ĵusaj vortoj povas soni kvazaŭ mi kritikas la Akademion, ke ĝi nenion faras. Sed male, mi aprobas la Akademion. Ĝi estas tamen grava forto, necesa ero de Esperantujo.

JL: Ĉu la funkcio de la Akademio do estas bremsi la ŝanĝiĝon de la lingvo?

BW: Mi ne scias, ĉu estas multe por bremsi. Eĉ se la Akademio ignorus la tutan ata/ita-problemon, ŝajne ĉio status tute same kiel nun.

JL: Ĉu troviĝas tiaj miskonceptoj pri la gramatiko de Esperanto, kiuj ofte aperas kaj kiujn vi ŝatus ĝustigi?

BW: Daŭre reaperas la mito, ke la pronomo “ci” iam estis uzata pli multe ol nun kaj ke ĝi poste malaperis, kiam oni ekuzis “vi” ankaŭ singulare. Reale “ci” neniam estis multe uzata, ĝi estis morta de la komenco. Ĝi eĉ ne ekzistis de la komenco; ĝi aperis mistere kun tuja deklaro ne uzi ĝin, kaj ĝi ja neniam uziĝis. Zamenhof bezonis ĝin ĉirkaŭ trifoje en siaj tradukoj el aliaj lingvoj. – Alia estas la “principo de neceso kaj sufiĉo”, al kiu oni ofte aludas ne sciante kio ĝi efektive estas. Ĝi estas teknika termino de unu specifa teorio de vortfarado kaj klarigas, kial oni diras “stultulo”, sed ne “patrulo” (en la senco “patro”). Oni tamen misuzas ĝin por priskribi tute aliajn fenomenojn. En la Plena Manlibro mi ne bezonas ĝin.

*Intervjuis Jouko Lindstedt*

## Terminologia gvidilo – kiel krei bonajn fakvortojn

*Heidi Suonuuti: Terminologia gvidilo.  
Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam 1998.  
38+4 p. ISBN 92-9017-057-3.  
El la angla tradukis Sabine Fiedler.  
Redaktis Wera Blanke.  
Prezo: 12 NLG.*

Fakaj terminoj necesegas por ke Esperanto estu ĉiukampe uzebla, altnivela kaj prestiĝa lingvo. Esperanta traduko de Terminologia gvidilo prezentas ĝenerale kiel plani kreadon de fakvortoj, kie serĉi fidindajn informojn, kiel ordigi kaj registri, kiel formuli difinojn kaj kiel organizi la laboron. La prezento estas kompakta (42 p.) kaj celas kreon de terminoj en iu(j) ajn lingvo(j).

La eldonanto estas UEA kun ĝia Terminologia Esperanto-Centro. Ekde 1990 UEA havas oficialan kunlaboran statuson en kategorio A kun la Teknika Komitato TC 37 de Internacia Organizo por Normigado (ISO). Celo de TC37, kies nomo estas “Terminologio (Principoj kaj kunordigo)”, estas krei bazon por terminologia laboro de la aliaj komitatoj de ISO. TEC klopodas peri la ating-aĵojn, i.a per ĉi tiu libro.

La aŭtoro estas Heidi Suonuuti, dufoja prezidinto de la Teknika Komitato kaj multjara estro de Finna Centro por Terminologio. La gvidilo estas originale verkita en la angla lingvo en 1997 komisie de Nord-term, komuna asocio de terminologiaj organizaĵoj de Nordio, por respondi oftajn demandojn. Tial la referencoj estas unuavice al la Nordiaj landoj.

La verko estas praktika gvidilo por labor-grupoj. La kvar unuaj ĉapitroj donas simple kaj kompakte sciojn pri la principoj kaj metodoj, kiuj devas esti konataj. Ili estas interesaj ankaŭ al nespecialisto: nocioj kaj nociosistemoj, difinoj, terminoj, harmoniigo de nocioj kaj terminoj (ĉi-lastaj per po unu paĝo).

Cetero de la 42-paĝa broŝuro priskribas necesajn etapojn de terminologia projekto (laborgrupo, limigo de la fako, fontoj, nombro de la nocioj, plano, kolektado kaj elektado de terminologiaj datumoj, nocio-sistemoj kaj difinoj) kaj terminografio (formo de difinoj, formo de registraĵoj, vicordo de registraĵoj, perkomputilaj metodoj). Unua aldono estas 21-vorta glosareto de terminologio en la angla, Esperanta kaj 6 nordiaj lingvoj, kaj la dua aldono elprenebla faldfolio kun 38 paŝoj de terminologia laboro.

Por serioza laboro la aŭtoro emfazas gravecon de laborgrupo kaj sperta terminologo kaj referencas al utilaj adresoj kaj ISO-normoj. Pro la kompakteco de la verko la referencoj estas nepraj. La gvidilo estas bazita sur aktualaj ISO-normoj kaj prezentas ilian

esencon koncize kaj praktike surbaze de multa praktika sperto. La klareco kaj logiko akompanas tre praktikajn konsilojn kaj ekzemplojn. Preserarojn mi ne trovis. La koncizeco necesigas zorgan studadon de la verko.

Esperantisto nature emas demandi, kial “decidua arbo” estas pli bona termino ol “folifaliga arbo”. La aŭtoro konsilas uzi normallingvajjn vortojn kaj singardi pri tradukado. Esperantistoj do uzu Esperanton, se eblas.

La ekzemploj estas unuavice el arbarscienco. La aŭtoro sciigas, ke ili estas intence simpligitaj por fari ilin pli facile kompreneblaj. Tiaj ili ja estas, sed foje ili ŝajnas plibonigeblaj: divido de arboj laŭ iliaj bezonoj al “lumbezonantaj arboj” (difinita kiel arbo bezonanta sunan lokon) kaj “toleremaj arboj” (arbo preferanta ombran lokon). Cetere la termino “preferata termino” ŝajnas al mi malpli bona ol “preferinda termino”. Mi forigus participon ĉiam kiam eblas.

Kelkaj vortoj, “projekto-manaĝado, kvalito-manaĝado” devus klariĝi de la kunteksto. Mi ankaŭ cerbumis pri la distingo inter “inkluzivi” kaj “inkludi” (ankaŭ “ekskludi” estas uzata). En la teksto min frapis la vortoj “aŭtorino”, “doktorino”, “redaktorino” k.s. Kial la koncernatoj volas emfazi sian inecon (tamen: “manaĝero”)? La vorto “terminografio” ne estas kutima kaj ne apartenas al la terminologia vortaro (nek multaj ĝenerallingvaj vortaroj). “Terminologia datumo” ankaŭ ne estas tute stabila vorto.

La verko estas zorge preparita, valora bazo por helpi elekton kaj kreadon de terminoj, ankaŭ en Esperanto, inda por jubilei 100-jariĝon de naskiĝo de la granda terminologo Euger Wüster (1898-1977), esperantisto.

*Matti Lahtinen*

## La enigma Durankulak

*Sabira Stchlberg, Durankulak, 80p.  
Bambu Ltd, Varna, Bulgario, 1998  
Aĉetebila en Esperanto-oficejo, Helsinki*

La libro Durankulak pensigas min pri kalejdoskopoj. Mi turnas la paĝojn, kaj aperadas vidaĵoj neatenditaj, surprizaj, kaj kiam mi turnas plu, aperas io jam konata, pecetoj kaj eroj kiujn mi rekonas surbaze de miaj propraj travivaĵoj kaj sentoj en aliaj ĉirkaŭoj.

La plej ofte reaperanta vidaĵo estas la urbo Durankulak mem. Ĝi estas “urbo sur la limo inter tempoj kaj mondoj, urbo de memoroj kaj forgesoj”, kie “aferoj nur estas...okazas... kaj neniu demandas kial”.

Unuj vidaĵoj en la libroforma kalejdoskopo konsistas el humuraĵoj. Tie renkonteblas ekz. hundoj kiuj parolas arte-faritan lingvon kaj estas kortuŝe homaj, kaj dikega muzulmana edzo unuŝua, kaj marĉokoboldoj kiuj ŝatas ludadi kaj ridegi en koto. Ankaŭ la koboldoj ne estas tute malhomaj.

Aliaj kalejdoskopajoj montras doloron, timon, solecon, sonĝojn kaj seriozon. Tie mi renkontis la Beston, kiu vivas en ĉiu homo kaj sen kiu homo fariĝus maŝino, kaj ruĝan monstron, kiu serĉas amon kaj kompaton.

Jam sufiĉas! La kalejdoskopo perdus sian ĉarmon, se mi ĉion malkovrus por vi. Vi mem turnu ĝin! Jen kaj jen videblos ankaŭ folklor-ecaj ornametoj nigre presitaj. La lingvo estas ĝuinda kaj pripensita, senerara kaj facilflua, kun mallongaj propozicioj. (Nur unu “park-eri” anstataŭ “parkerigi” dubigis min.)

*Saliko*

## Malvarma ombro de satiro

Arto Paasilinna:  
*Hirttämättömien lurjusten yrттitarha.*  
 WSOY. Juva 1998.  
 ISBN: 951-0-22936-9

La romanoj de Arto Paasilinna estas klasifikitaj ofte kiel humoraj pikareskromanaj. Lia 25a verko "Hirttämättömien lurjusten yrттitarha" faras nigran ombron al tiu klasifiko. Multloke la romano ne donas al la leganto naivisman, bonkoran humortravivaĵon kiel liaj antaŭaj verkoj. Jaron post jaro la malvarma ombro de satiro grandiĝas en liaj romanoj. Malvarmigas, ne ridigas aŭ eĉ ne ridetigas la leganton. Rigidigas kiel korpon de la morto en la lasta ridetaĉo.

La romano de Paasilinna rakontas pri privata koncentrejo en Laponio, pri la drogherba bieno Peuravuoma en Turtola, inter marĉoj. La posedantoj de la drogherba bieno celas naive forigi la malbonajn el la mondo. Ili kidnapas libereirantajn kriminulojn kaj haŭtkapulojn kiel sklavojn en kiel punlaborejo transformigita minejo, kie ili faras eĉ 16 horojn diurne fungoprilaboradon.

Pri la bieno Peuravuoma intresiĝas ankaŭ la sekurecpolicisto Jalmari Jyllänketo el Finna sekurecpolico SUOPO. La rakonto kontinuas per komplika intrigo, sed havas feliĉan finon. Kiel flankpersono en la romano estas sekurecdetektivo Kylmäsaari. Neklera policisto, kiu povas paroli iujn vortojn en la angla, sed flue en Esperanto. Esperanto estas menciita sur paĝoj 161, 164, 255 kaj 261 de la romano. Dankon al aŭtoro pro senkosta reklamo por Esperanto.

Aimo Rantanen

## Opin uusia sanoja

Christiane De Vleminck kaj Emile Van Damme:  
*Leksikaj ekskursoj, unua volumo, 118 s.*  
 Flandra Esperanto-Ligo 1997

Tietysti opin uusia sanoja kirjeistä ja lehtiartikkeleista ja kun itse joudun omiin tarpeisiin etsimään sanakirjasta, mutta mielenkiintoista lukemista oli Christiane De Vleminckin ja Emile Van Dammen kirja Leksikaj Ekskursoj.

Itselleni kirja oli melko helppo ja saatoinkin sulattaa 4-5 sivua yhdellä istumalla. Aloittelijalle se voi olla rasittavampi mutta myös vielä hyödyllisempi. Panin oppimani sanat muisiin paperille ja kertosin siitä seuraavana päivänä. Siirsin ne myös sanakirjani suomi-esperanto -puolelle, jos niitä ei ollut siellä ennestään. Tässä muutamia löytöjäni. En kuitenkaan väitä, ettei samoja asioita voisi toisinkin sanoa:

dementia *demenco*  
 ajanviete *tempopasigilo*  
 perenna *plurjara planto*  
 parhain nuoruus *la floro de la juneco*  
 hymy hyytyi *la rideto glaciigis*  
 hänellä on märtä korvantakuset *li havas ankoraŭ lakton sur la lipoj*  
 nukkua kuin tukki *dormi ŝtonan dormon*  
 pata kattilaa soimaa *azeno riproĉas azenon pro malsaĝo*  
 pyörryttävä *vertiĝdona*  
 motti, kuutio (puita) *stero*  
 nahkapalli tms *pufseĝo*  
 ympärpäissään *ebria kiel funelo TAI ..kiel barelo*  
 torkkua *somnoli*  
 hän on tossun alla *li estas sub la ŝuo de sia edzino*

# INFORMA BAZARO

## Premio

### “La verko de la jaro”

Same kiel pasintjare okazos en 1999 la premio “la Verko de la Jaro 1998” organizita de Kooperativo de Literatura Foiro.

Kandidatajn titolojn proponas almenaŭ tri membroj de la Esperanta PEN-Centro. La premio estas referendumme asignata ĉiujare de la abonantoj de la revuo Literatura Foiro jen al poezia jen al proza verko.

Por 1999 kandidatas nur prozaj titoloj surmerkatingitaj en 1997-1998. La libro “El miaj sonoraj soloj” de Miguel Fernández Martín gajnis la premion “la Verko de la Jaro 1997”.

## La 15a Printempa Semajno Internacia

Aranĝota de la Germana Esperanto-Asocio okazos 3-10 aprilo 1999 en St. Andreasberg, en la montaro Harz. Seminario, kies precipa celgrupo estas familioj kun infanoj havos temon “Kultura diverseco en Eŭropo”. Ĉiu estos bonvena, ankaŭ unuopuloj. En la seminario estos kursoj por komencantoj kaj progresantoj. Informojn donas Wolfgang Bohr, Johannes-Kirschweg-Str. 11, D-53474 Bad Neuenahr-Ahrweiler, Deutschland, Tel. +49-(0)2641-4885, Rete: psi@esperanto.de

aika matelee *la tempo treniĝas testude*  
pakokauhu valtasi heidät *paniko kaptis ilin*

Tuossa yllä sanat ovat mielivaltaisesti sekaisin, mutta kirjassa tällaiset sanat esitetään hauskaasti juonen seassa ja vahvistetaan harjoituksin ja sanaristikoin. Kirjaa on tulossa vielä 2 osaa. Suosittelem.

*Saliko*

## Ilmoittaudun talvipäiville

Nimi \_\_\_\_\_

Osoite \_\_\_\_\_

Puh. \_\_\_\_\_

### Ilmoittautumismaksu

31.1.1999 saakka 60,-

28.2.1999 saakka 90,-

sen jälkeen 120,-

Puoli maksua Steleton ja FEJOn jäseniltä. Ensikertalaiset, ulkomaalaiset, ei-esperantisti -seuralaiset ja lapset ilman ilmoittautumismaksua.

### Majoitus ja ruokailut

Paketti (asuminen + ruokailut)

2 hengen huoneessa 460,-

\_\_\_\_\_ kanssa  
1 hengen huoneessa 615,-

Ruokailut ilman majoitusta 220,-

### Haluan vieraila Nestossa:

lauantaina 20.3 klo 11-12

sunnuntaina 21.3 klo 15-16

### Toivomuksia majoituksen ja ruokailun suhteen:

\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_

Lähetä lomake osoitteella:  
Esperantoseura Antaŭen ry  
Teivaalantie 85  
33400 Tampere

Maksa tilille:  
Esperantoseura Antaŭen ry  
Leonina 800011-359984

**TERVETULOA!**

## Mi aliĝas al la vintraj tagoj

Nomo \_\_\_\_\_

Adreso \_\_\_\_\_

Tel. \_\_\_\_\_

### Aliĝkotizo

ĝis 31.1.1999 60,- ĝis 28.2.1999 90,- poste 120,- 

Duona pago por membroj de Steleto kaj FEJO. Unuafojaj, eksterlandanoj, ne-esperantistaj kunuloj kaj infanoj sen aliĝkotizo.

### Tranoktado kaj manĝoj

Paketo (tranoktado + manĝoj)

en 2-lita ĉambro 460,- 

kun \_\_\_\_\_

en 1-lita ĉambro 615,- Manĝoj sen tranoktado 220,- 

### Mi volas viziti Neston:

sabate 20.3 je la horo 11-12 dimanĉe 21.3 je la horo 15-16 

### Deziroj koncerne tranoktadon kaj manĝojn:

---



---



---

Sendu la aliĝilon al:

Esperantoseura Antaŭen ry

Teivaalantie 85

33400 Tampere

Pagu al la konto:

Esperantoseura Antaŭen ry

Leonia 800011-359984

**KORAN BONVENON!**

## Alvoko al jarkunveno

La laŭstatuta jarkunveno de Esperanto-Asocio de Finnlando okazos la 21-an de marto 1999 en Tampere, en hotelo Ramada je la 10-a horo. Adreso Yliopistonkatu 44. Ĉiuj membroj alvokataj. En la aferlisto estos la aferoj difinitaj en la statuto.

*Estraro*

## Vuosikokouskutsu

Esperanto-Asocio de Finnlando – Suomen Esperantoliitto ry:n sääntömääräinen vuosikokous pidetään sunnuntaina maaliskuun 21. päivänä 1999 klo 10.00 Tampereella hotelli Ramadassa, os. Yliopistonkatu 44. Käsiteltävänä ovat säännöissä määrätyt vuosikokousasiat. Kaikki jäsenet tervetulleita.

*Hallitus*

## Kutsu ylimääräiseen yleiskokoukseen

Suomen Esperantoliitto – Esperanto-Asocio de Finnlando ry:n ylimääräinen yleiskokous pidetään lauantaina 16. tammikuuta 1999 klo 12.00 liiton toimistossa os. Siltasaarenkatu 15 C 65 Helsinki.

Kokouksessa käsitellään vuoden 1997 tilinpäätöksen virheiden oikaiseminen. Oikaisutarpeen aiheuttavat Mannerheimintie 148:sta myydyn asunto-osakkeen myyntituottojen kirjaamisessa tehdyt virheet, joiden seurauksena liiton tilinpäätöksessä oli Helsingin Esperantoseuralle kuuluvia varoja.

Tarkempia tietoja käsiteltävästä asiasta antaa rahastonhoitaja Antti Mikkola ja puheenjohtaja Jukka Laaksonen.

*Hallitus*

## Suomen esperantoliiton jäsenjärjestöt

Muutokset ja lisäykset osoitteistoon Aimo Rantaselle, PL 2, 40801 Vaajakoski, s-posti *aimo.rantanen@pp.inet.fi* mieluummin kirjallisina.

Suomen Esperantoliiton paikallisyhdistykset toimivat:

- ♦ Helsingissä: Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarencatu 15 C 65, 00530 Helsinki. Sähköpostiyhteys: Sakari Kauppinen, sakari@skau.pp.fi
- ♦ Iisalmessa: Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi
- ♦ Jyväskylässä: Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä, PL 136, 40101 Jyväskylä. Sähköpostiyhteys: Matti Lahtinen, matlah@sci.fi
- ♦ Lahdessa: Lahden Esperantokerho / Esperantoklubo de Lahti, (Martti Pennanen) Kalliomaankatu 10, 15150 Lahti. Sähköpostiyhteys: Martti Pennanen, fin.lahti@marttip.pp.fi
- ♦ Mikkelissä: Mikkelin Esperantokerho / Esperantoklubo de Mikkeli, (Elli Husso) Porrassalmenkatu 27 B 51, 50100 Mikkeli.
- ♦ Oulussa: Oulun Esperantoseura / Esperantosocieto de Oulu, (Allan Mehtonen) Valtatie 6-8 B 15, 90500 Oulu
- ♦ Salossa: Salon Esperantokerho / Esperantoklubo de Salo (Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla

- ♦ Tampereella: Tampereen Esperantoseura Antaüen / Esperantosocieto Antaüen, (Jukka Laaksonen) Uudenkylänkuja 2 B 11, 33530 Tampere. Sähköpostiyhteys: Veli Hämäläinen, veli.hamalainen@pp.kolumbus.fi
- ♦ Turussa: Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku, (Tiina Oittinen) Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. Sähköpostiyhteys: Tiina Oittinen, tiina.oittinen@orion.fi
- ♦ Lappeenrannassa esperanton harrastajilla ei ole järjestöä, vaan "esperantoryhmä", jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Miettinen) Esperantogrupo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta.

Lisäksi Suomen Esperantoliittoon kuuluu

- ♦ Suomen opettajien esperantoliitto, Jykyrintie 3, 69440 Lestijärvi. Sähköpostiyhteys: Raita Pyhälä, raita.pyhala@lesti.kpnet.fi puhelin (06) 8637 351
- ♦ Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarencatu 15 C 65, 00530 Helsinki
- ♦ Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. Pietarinkatu 10 D27, 00140 Helsinki. Sähköpostiyhteys: Ritva Sabelli, Ritva.Sabelli@sfs.fi, telefaksi (09) 660 651

Useiden paikkakuntien puhelinluettelosta hakuksanan "Esperanto" kohdalta löytyy paikallisten harrastajien puhelinnumeroita.

### ELFI:

#### Alvoko al jarkunveno

Laŭstatuta jarkunveno de Esperanto-ligo de Finnlandaj Instruistoj okazos sabate, la 20an de marto 1999 ekde la horo 16.30 en hotelo Ramada, Yliopistonkatu 44 Tampere, proksime al Tampere halo. Traktotaj estas laŭstatutaj aferoj. Ĉiuj estas bonvenaj.

*Estraro de ELFI*

### Jette Kintaantekijän näyttely

Vuoden 1999 alussa pidetään Esperanto-yhteisistään tunnetun Jette "Kintaantekijä" Uzanen käsityönäyttely Iisalmessa. Siinä on yhteensä 25 paria kintaita. Kintaat on ryhmitelty sarjoiksi kuin taideteokset. Sarjoista tunnetuin on "Vanhan talon ikkunat ja tragedia viidessä näytöksessä", missä hän kuvaa monen latvialaisen tilan julmaa kohtaloa.

*Kimmo Hakala*

## Raporto pri librofoiro en Turku

La librofoiro okazis en la foira centro de Turku de la 16-a ĝis la 18-a de oktobro. Samtempe okazis ankaŭ scienca kaj religia & vivideologia foiroj. Interesitoj povis viziti la tri foirojn per unu bileto. La nombro de vizitantoj estis pli ol 20000, kio signifas kreskon da 5000 el la antaŭa jaro.

Esperanto-Asocio de Finnlando partoprenis la librofoiron per propra stando en la halo A, la librofoira halo. La funkciuloj de EAF prizorgis plejparte administrajn laborojn kaj pri la deĵorado en la stando respondecis membroj de la loka klubo, Esperanto-societo en Turku. La stando estis modesta laŭ gran-



*Hejma salono de esperantisto kiel stando dum Turku-a librofoiro. D-ino Aira Kankkunen el Svedio ĝuis la etoson.*

deco sed plenplena je Esperanto-aĵoj. Ĝi emis montri hejman salonon kun tiatipaj dekoracioj: tie troviĝis tablo kaj seĝo, kurtenoj, libroŝranko, tapiŝo sur la planko kaj eĉ televidilo. Aranĝi tian standon postulis pli multe da laboro ol kutima informa stando sed estis eksperimentinda.

La loko estis kontentiga ĉar la stando estis sufiĉe bone videbla kaj ĝin trovis relative multaj vizitantoj. Ĝojige estis la granda proporcio de gejunuloj kiuj volis informiĝi pri Esperanto. Eble unu kaŭzo estis la malgranda reklamo kiun la asocio havis en Kirjava, la librofoira gazeto de liceanoj, kiu aperis ĉiun tagon kaj estis distribuata senpage dum la foiro. La komentoj pri Esperanto estis plejparte pozitivaj kaj intereso por kursoj estis preskaŭ furora: pluraj petis pliajn informojn kaj du eĉ aliĝis poste al la jam komencinta kurso en Turku.

Laŭ invito de Esperanto-Asocio de Finnlando la foiron partoprenis ankaŭ d-ino Aira Kankkunen el Gotenburgo, Svedio. Ŝi deĵoris en la stando kaj ĉiun foiran tagon je 13.30 prezentis siajn verkojn en la stando, neformale sed laŭ la programo de la foiro. Ŝia ĉefkontribuo okazis tamen sur la podio dimanĉe je la horo 16.00, kiam ŝi, prezentante ŝian ĵus finlinlingve aperintan libron “Ja ovet avautuivat...”, prelegis pri ŝia laboro por solvi la aŭdproblemojn de infanoj. Bedaŭrinde la prelegon sekvis nur kelkaj aliaj krom esperantistoj, sed la eferto tute ne estis vane, ĉar la prelego staris ja en ĉiu programfolio de la foiro.

Por Esperanto-Asocio de Finnlando mi volas ĉi tie kore danki al ĉiuj kiuj laboris por partopreno al la foiro. Jen la grupo, kiu



konstruis la standon, deĵoris tie kaj malmuntis la standon: Anna-Liisa Ali-Simola, Paula Harju, Aira Kankkunen, Varpu Karo, Jukka Laaksonen, Leila Laineoja, Anja Launiainen, Ilmari Launiainen, Arja Lyly, Harri Melasniemi, Tiina Oittinen, Ulla Salonen, Veikko Tikkanen kaj Leena Tiusanen.

*Päivi Saarinen*

### **Kirjailija Aira Kankkusen tuotantoa**

*(samassa kappaleessa ovat saman teoksen erikieliset versiot)*

*Opi ymmärtämään minua* 1963

*Lär dig förstå mig* 1964

*Klopodu kompreni min* 1993

(tämä teos on käännetty myös kielille: englantia, espanja, heprea, italia, katalonia, norja, portugali, tulossa ovat käännökset bulgariaksi ja unkariksi)

*Hör ditt barn?* 1986

*Ĉu vi aŭdas, mia bebo* 1998

*Ja ovet avautuivat...* 1998

*Och dörrarna öppnade sig* 1990

*Seuramatkalla* 1998

*Interrilatoj* 1995

(runokokoelma)

*Eilistä ei voi muuttaa* 1998

*Neniu povas ŝanĝi hieraŭon* 1996

(runokokoelma)

*Kaj tiam floris ĉerizarboj* 1997

(novellikokoelma)

*Yhteispeli* 1998

*Societaj ludoj* 1998

(aforismikokoelma)

*Fore de siaj praradikoj ili surteriĝis* 1984

(runokokoelma)

*Kokosi : Anna-Liisa Ali-Simola*

## **EDUSEM**

Lastsomere 1998 ELFI aranĝis en Jyväskylä kurson de Esperanto por instruantoj, -intoj aŭ -emuloj. Ĉeestis 14 personoj, kiuj dum tre densprogramaj sabato kaj dimanĉo ricevis novajn sciojn pri instruado de Esperanto aŭ disdonis siajn spertojn. Ni havas aktivan grupon, kiu esprimis sian bezonon pri samtipa kurso dum somero 99 tamen kun diferenca programo.

EDUSEM, eduka semajnfino okazos la 2an ĝis la 4an de julio 1999 en Tampere ĵus antaŭ la Semajno de 12 steloj, internacia Esperanto-semajno. La kursejo estos la Agrikultura kaj mastumada instituto de Ahlman en Koivistonkylä en Tampere. Oni ĝin jam konas de la antaŭaj kursemajnoj. Ni uzos antaŭ kelkaj jaroj renovigitan ĉefkonstruaĵon, kiel dum somero 97.

EDUSEM komenciĝos vendredvespere 2.7 je la horo 19.00 kaj finiĝos dimanĉe 4.7 je la horo 15.00 kiam okazos la fermo de la kurso. La programo estos tre intenziva, ĉar ĝi daŭros tiom mallongan tempon. Ni invitis Dr-on Katalin Smidéliusz el Hungario kiel instuonton. Ŝi estas instruisto en pedagogia altlernejo kaj gvidis multajn ekzemple Cseh-kursojn. Tiun metodon ŝi tamen ne uzos dum nia EDUSEM. Ni esprimis deziron ricevi konsilojn pri praktika laboro, ĉar pasintsomere ni ricevis pli da scioj pri teorio por instruado. La instrulingvo estos Esperanto.

Pli precizajn sciojn vi ricevos pli poste, sed jam nun vi povas rezervi tiun semajnfino en via kalendaro por EDUSEM.

*Sekretario de ELFI*

*Sylvia Hämäläinen*

*Tel. (03) 346 3493*

*Retadr: veli.hamalainen@kolumbus.fi*

*Teivaalantie 85, 33400 TAMPERE*

## ”Ni esperas akcepti vin en nia hejmo”

En aŭgusta mateno mi aŭdas la sonoron de la hejma vekhorloĝo nekutime frue je la kvara horo. Senbezone, ĉar mi estis jam vekiĝinta el maltrankvila dormo. Per rapidemaj movoj mi ellitiĝas, kuiras, kiel kutime akvon, avenan kaĉon kaj kafon. Je la sesa horo deteriĝos en Oulu la aeroplano, kiu transigos min kaj mian filon al Helsinki. De tie ni daŭrigos al Zürich.

Post trihora flugo aŭdiĝas la stevardina voĉo: ni proksimiĝas al Zürich, alfiksu la sekurzonojn. Iom streĉita mi pensas pri baldaŭa renkonto kun mia franca leteramiko atendanta nin en la aerodromo. Ĉu ĉio pasos kiel konsentite?

Ni ricevas niajn valizojn, sin puŝas antaŭen en la homamaso kaj – jen subite vidiĝas la konata figuro: la amiko Serĝo etendas siajn manojn, ni ĉirkaŭbrakas unuj la aliajn. Li kaptas helpeme mian valizon kaj gvidas nin malsupren en la grandan aŭtohalon de la vastega aerodromo.

Post pago de parkado Serĝo startas sian aŭton kaj ni komencas veturadon direkte al lia hejmo en la vilaĝo Charquemont situanta kelkajn kilometrojn de la svis-franca limo kaj 20 km de la svisa urbo La Chaŭ de Fonds. Post ĉirkaŭ trihora aŭtokuro ni atingas tiun kamparadon, kies figuron mi jam konas per fotoj ricevitaj dum nia unu- kaj duonjara korespondado. Sur la korto nin akceptas la ĉarmaj dommastrino Beatrica kaj la filino Sonja. Mi sentas min malcerta.

Ĉu mi efektive nun staras sur la korto de tiu ĉi domo? Eble mi nur sonĝas. Ĉi-matene mi el-litiĝis en mia propra hejmo en Oulu, posttagmeze samtage mi staras ĉi tie en Charquemont en Francio ĉe la Ĵurasaj montoj. Tion ebligis la nuntempa komforta flugo super la nuboj – kaj antaŭ ĉio – la lingvo de amikeco, Esperanto. La domo en kiu ni, Paavo kaj mi, estis alvenintaj, estas malnova, 160-jara biendomo duetaĝa. La tera parto estas farita el ŝtonoj, la supra el ligno. Kiel konate, malnova konstruaĵo postulas daŭ-

ran riparadon. Tion plenumas la mastro, profesie instruisto pri biologio, fiziko kaj kemio.

La stilo kaj la konstruo de tia kamparadomo estis al mi novaj, nekonataj. Niaj finlandaj kamparbiendomoj malsimilas. Multajn detalojn mi observadis kaj trovis interesaj. Unu el tieaj estis la akvosistemo de la domo: ĝi ne bezonas la komunuman akvoservan reton, sed utiligas por la dommastrumaj bezonoj la pluvakvon, kiu de sur la tegmento fluas tra tuboj en subteran cisternon, de kie ĝi estas kondukata pere de pumpiloj en la domon.

Ĉu tiu akvo sufiĉas por la lavbezonoj de la tripersona familio kaj gastoj, pri tio mi komencis dubi. Mi aŭdis, ke ”pro la malnova kaj malgranda cisterno okazis nur dufoje ekde 40 jaroj akvomanko”. Pasintjare estis instalita dua, pli granda cisterno. Surprizis min ankaŭ, ke en tiu loko, situanta 900 metrojn super la marnivelo, povas vintre frosti eĉ ĝis 30 C-gradoj.

La ĉefurbo de la provinco Franche Comté (Franĉkonteo en E-o) estas Besançon kun 130000 loĝantoj. Ni vizitis la urbon kaj ĝian historian citadelon. Ni ascendis la citadelan remparon, kie antaŭ jarcentoj gardostaris soldatoj por observi eblajn atakantojn. Belega vidaĵo etendiĝis antaŭe kaj malsupre de ni: la urbo Bezançon en meandro de la rivero Doubs, sur kies akvoj glitis pasaĝerŝipoj. Pitoreska panoramo.

Sed ni revenu al la domo en Charquemont. Dum tiuj kvin tagoj de nia gastado regis varmo ĝis 31 C-gradoj. La tagaj aŭtoveturadoj lacigis min tiel, ke reveno al la domo, kie atendis sinjorino Beatrica kun pretaj manĝaĵoj, fariĝis oazo de ripozo kaj malstreĉiĝo. Ĝoje ni aŭdis ŝian alvokon al la vesperamngō en la verando, kie sur la tablo staris pladoj da bonodoraj multspecaj manĝaĵoj: legomoj el la propra ĝardeno, pastaĵoj, fromaĝoj kaj vino.

## E-gazetaro

### Esperantisto slovaka

Tutmonde multlegita, kaj laŭ enhavo kaj enpaĝigo altkvalita E-periodaĵo, kiu ne havas fiksan abonprezon. Tio estas Esperantisto Slovaka. Redaktoro Stano Marček faris tre bonan laboron en refreŝigo de la jaro 1946 aperanta organo de slovakaj esperantistoj. Kaj tiu laboro rikoltas nun prestiĝon inter la tumonda Slovakio-simpatiantaro.

Esperantisto Slovaka havas sekciojn: 1. Esperanto en Slovakio, 2. Tra Esperantujo. 3. Naturamikaj paĝoj, kaj Beletra angulo. Ekzistas ankaŭ ĉefartikolo, Leteroj al la redakcio, anoncoj kaj aliaj diversajoj kiel en aliaj E-periodaĵoj. Precipe rimarkinde estas la Leteroj al la redakcio -sekcio, kies multaj verkantoj estas ĉie en la mondo vivantaj E-eminentuloj.

En la Esperantisto Slovaka 1/98 estis nekrologo pri morto de Ernesto Vana, la fondinto de la periodaĵo. Unu artikolo pritraktis la kunlaboron inter Triesto kaj Slovakio. La lando Slovakio havas riĉan naturon, kaj tiel ekzemple mikologoj, sciencistoj, kiuj esploras fungojn havas vastan laborteron. La kunlaboro kun ĉeĥoj estas multflanka, en la Beletra angulo legeblas novelo "Psikiatria mistero" de Jaroslav Hašek. Nova videoflmo "En somera vilao" aĉeteblas ĉe la redakcio.

En Finnlando Esperantiston Slovakian peras Raimo Tuisku, Puistotie 79-81, as. 14, 04430 Järvenpää. Li donas ankaŭ pliajn informojn pri la revuo.

*Aimo Rantanen*

La suno brilis kaj varmis ĝis malfruaj horoj de aŭgusta vespero, kvazaŭ dezirante siaparte regali nin nordulojn per franca varma gastamo. Ni babilis kaj babilis. ne mankis temoj. "Ni ofte rememoras la belajn tagojn, kiujn ni kune pasigis, kaj la parolajn skermadojn ĉe niaj vespermanĝoj", skribas Sergo en sia letero.

La kvintaga vizito ĉe niaj francaj geamikoj pasis tro rapide. Nian interkonatiĝon naskis la elsendoj de la Pola Radio: Sergo registris sur sonkasedo mian saluton destinitan al alia franco, sendis la programon al mi, poste plurajn aliajn, kaj tiel kreiĝis nia amikeco, kies ĝisnuna kulmino estis mia vizito en lia hejmo. Nun mi vivtenas la esperon akcepti miavice en Oulu gastojn el Charquemont.

*Allan Mehtonen*

### Suomen esperantoliikkeen puute

Suomalaisella esperantoliikkeellä on suuri puute: Meillä ei ole toimivaa kirja-ja lehtimyyntiä. Monta vuotta sitten entinen tämän alan yrittäjä jo tarjosi kirjamyntiä toisille tehtäväksi. Mitään tuottoisaa tai suurta ei kirjamynti toki ole, samanalaista aikaavaativaa vapaaehtoistyötä kuten muukin esperantotoiminta, mutta ehkä sillä saa kulut peitettyä. Luontevimmin esperantokirjojen ja -lehtien myynti tapahtuisi jo ole-massaolevan yrityksen sivuelinkeinona. Silloin ei tarvitse perustaa eri kirjanpitoa tai tehdä eri arvonlisäveroilmoituksia. Ja jo valmiiksi hioutunut yrittäjän ammattitaito olisi myös valmiina. Löytyykö Suomesta yrittäjää joka ottaisi sivuelinkeinokseen esperantokirjojen ja -lehtien myynnin?

*pema-z*

## Amo kaj kometoj gitare kaj kontrabase

*La 29-an de novembro Persone koncertis akustike en Helsinko por proksimume kvindeko da personoj.*

En akustika koncerto Martin Wiese kaj Bertilo Wennergren ludas akustikan gitaron. Martin ĉefkantas, Bertilo kante akompanas lin. Anders Grop ludas kontrabason, kiu estas malofta instrumento en akustikaj koncertoj. Anders kaj la instrumentego estas kvazaŭ la spino de la tutaj. Li donis varman fonon al la gitaroj, foje la baso aliĝis al la akustikaj gitaroj kvazaŭ eta, agrabla surprizo. Dum la koncerto la publiko povis ankaŭ sperti instrumentetojn, kiuj nomiĝas “ovoj”. Tiujn ovoformajn ritmoinstrumentojn foje ludis Bertilo, foje Martin.

La koncerto konsistis el kelkaj akustikaj versioj de rokaĵoj konataj el la K-disko “Povus esti simple”. Plejparte estis tamen novaj Persone-kantoj ankoraŭ ne aŭskulteblaj diske. (Sed baldaŭ!) La novaj kantoj klare montris, ke la kre-

emo de Martin Wiese certe ne stagnis. La koncerto ofertis al ni ne revestitaĵojn – bedaŭrinda fenomeno ĉe multaj komponistoj – sed efektive serion da novaj pecoj.

En la temoj plue ĉefrolas amo kaj kometoj. Martin Wiesen oni povus kun bona kialo nomi la nekronita reĝo de esperanta rokliriko. Fortaj kantotekstoj en Esperantujo ne abundas, multaj estas simplaj, trivialaj, sensurprizaj. Liriko de Martin Wiese tamen fluas, ravas, freŝas kiel poezio. Liaj tekstoj, speciale la prikometaj, tamen ne tre facile malfermiĝas al la aŭskultantaro. Kun plia facilo kapteblas la etosoj de liaj melankoliaj amkantoj, amo pasinta, nuna aŭ manko da ĝi ja apartenas al ĉies vivo.

Muzike multaj el la novaj kantoj estis sufiĉe klarmelodiaj kaj facile kunkanteblaj kun fortaj refrenoj, kiuj postkoncerte pluzumadas en oreloj de aŭskultantoj. Se en esperanta mondo ekzistus radiostacioj kun ĉiusemajnaj listoj de 10 furoraĵoj, mi certas, ke “Liza pentras bildojn” baldaŭ



## Ĉe kafotablo kun Persone

estus la numero unu. Tiel mi iom bedaŭras, ke la koncerto komenciĝis per ĝi kaj ke oni tiel eble misuzis ĝian forton por varmigo de la publiko. La finkanto de la koncerto, aldona numero, estis multe pli trafe elektita, belega, religitema “Patronia”. Pliaj eventualaj estontaj klasikaĵoj estas “Sola?” (Bone notu la demansignon por ne miksi kun la jama klasikaĵo “Sola” de Amplifiki) kaj “Lasu min sonĝi”.

Aparte menciindas kaj -endas du tute freŝaj kantoj komponitaj de Bertilo Wennergren. Speciale “La fantoma lum” “ estis unu el la koncertaj perloj kaj certe bone konkursus kun “Liza” por iĝi la venontsemajna numero unu. Bertilo komponas kaj lirikas pli molstile ol Martin. La tempo montros, ĉu ni aŭdos pli da bertilaĵoj kaj kiel kongruos la stiloj de la du komponistoj, sed almenaŭ mi kun intereso kaj avido atendas plian lion.

Antaŭe mi aŭdis Personen akustike aŭguste, en la montpeliera UK en koncerthalego. Al miaj amatoraj oreloj ŝajnas, ke de aŭgusto ilia akustika repertuaro muzike maturiĝis. Nun pli bone funkciis Martin kaj Bertilo kiel duopo, nun pli interharmoniis iliaj voĉoj. Eble akustika koncerto ankaŭ ĝenerale pli taŭgas al malgranda ejo. Tiel la etoso pli intimas ol en gigantaj koncert-halegoj, kie la muzikistoj facile restas iom foraj al sia publiko.

La duopeco de Martin kaj Bertilo bone funkciis ankaŭ en la kantoenkondukaj interbabiloj, kiuj aparte spicis la koncerton.

La helsinkia koncerto estis ĝuinda kaj bone konstruita tutaĵo, en kiu la bandanoj lerte alternigis kantojn pli malrapidajn kaj pli viglajn. Tamen ĝojigis min aŭdi el la publiko komenton “La muziko ne tute estis laŭ mia gusto...”. Estas tre bonvena evoluo, ke ankaŭ la esperanta publiko havas gustojn kaj preferojn, taksas muzikon kiel muzikon kaj ne al ĉio aŭtomate aplaŭdas nur ĉar estas en Esperanto.

*Riitta Hämäläinen*

Persone estas sveda rokbando, kiu prezentas originale en Esperanto verkitan muzikon. La grupo naskiĝis en 1986 kiel nura provizora projekto por KEF, Kultura Esperanto-Festivalo en Svedujo, sed pro granda sukceso la grupo daŭrigis. La grupon iniciatis Börje Lund, nuntempe eksbandano. La nuna konsisto de la bando estas Bertilo Wennergren, Martin Wiese kaj Anders Grop. Wiese kaj Wennergren estas veraj veteranoj de esperanta roko. Ambaŭ ludis ankaŭ en Amplifiki, kiu registris la tute unuan esperantan rokkasedon en 1986 (“Tute ne gravas”). Tiel esperanta rokmuziko estas nun 12-jara.

La nuna konsisto de Persone estas de la jaro 1990. La saman jaron okazis la unua koncerto kun la nova konsisto: En Finnlando dum la Kvinpinta Semajno en Naantali. Tiutempe Anders ankoraŭ ne parolis Esperanton.

Riitta: Kiel vi venis al la grupo, Anders? Kaj kial?

Anders: Martin demandis min. Martin kaj mi kune studis en rokmuzika lernejo kaj Martin demandis, ĉu mi volus ludi en “diferenca” rokbando.

R: Ĉu vi kantas kaj ludas ankaŭ en ne-esperantaj grupoj?

A: Mi ludas en multegaj tre diversaj, mi laboras kun muziko.

Anders estas profesia muzikisto, kiu i.a ludas en latinamerika grupo en restoracioj. Martin Wiese estas arkitekto, Bertilo Wennergren fama esperanta gramatikisto. Nek Martin nek Bertilo momente ludas en svedlingvaj grupoj. Ĉiuj tri estas stokholmanoj. La unuaj paŝoj de esperanta rokmuziko estas plene skandinaviaj: Kaj Amplifiki kaj Persone konsistis siatempe nur el skandinavianoj.

R: Kaj kial esperanta roko naskiĝis kaj plu-  
fortas ĝuste en Nordio? Ĉu estas pro KEF, ĉu hazardo?

Martin: Mi pensas, ke estas ĉar ĉiuj ludas en Svedio. Estas ĝenerale tiel, ke ĉiuj homoj ludas iun instrumenton, ĉiuj ludas en rokbandoj. Almenaŭ en Svedio estas tiel. Mi supozas, ke la sinteno estas tute alia en aliaj eŭropaj landoj, kie ne ĉiuj ludas.

R: Via stilo multe ŝanĝiĝis de via unua kasedo “62 minutoj”, ek de Börje ne plu estas ne la bando.

Bertilo: Jes, li multon verkis.

R: Kiel vi rilatus al tio, se la publiko subite postulus aŭ petus iun Börje-klasikaĵon, ekzemple “Ĉu vi pentas?”

B: Tio neniam okazis, sed ni ofte fantazias pri tio... Ni ne kapablas.

R: Per Esperanto vi atingas tre malvastan publikon. Kial en Esperanto kaj ne en la sveda aŭ en la angla?

B: En Esperantujo oni pli bone komprenas Esperanton ol la svedan...

R: Ĉu ne foje estas frustige por vi la malgranda publiko? Ankaŭ mi havas la impreson, ke al esperanta publiko ofte egalas kion kaj kiel, se nur en Esperanto.

B: Iom estas tiel. Oni ĉiam laŭdas ĉion kion oni prezentas en Esperanto. Sed tamen oni distingas, se estas bone, oni pli serioze rilatas al la afero. Oni ne estas tute stultaj... (Rido)

R: Ĉu la sintenoj multe ŝanĝiĝis dum la pasintaj 10 jaroj?

M: Mi havas la impreson, ke la aranĝantoj de renkontiĝoj kaj la publiko iom serioziĝis en la lastaj 5 jaroj. Ekzemple oni ne same postulas, ke ni ludu tute senpage, antaŭe oni ĉiam postulis, ke ni mem pagu la vojaĝon.

B: Eble oni menciis, ke tiu serioziĝo de la lastaj jaroj multe dependas de Flo.

M: Li estas vera heroo.

Flo estas Floreal Martorell el Francujo. Li estas la fondinto de Eurokka, Esperanto-Rok-Asocio. La organizo i.a eldonas revuon, kiu nomiĝas “Rok Gazet”.

R: Vi nuntempe havas du vizaĝojn: La elektan rokmuzikan kaj la pli molan akustikan. Kiel

naskiĝis la akustika flanko?

B: Estis Lumfesto de stokholma klubo antaŭ tri jaroj. Ili proponis al ni, ke ni ludu ion kaj ni havis la frenezan ideon, ke ni ja ludu... ke ni tamen povus akustike.

M: Mi komponis antaŭe kelkajn kanzonojn por akustikaj gitaroj, sed ne sciis kiel vere uzi ilin.

B: Eble komence tiu ĉi akustika afero estis preskaŭ kiel ŝerco, iu amuzaĵo, sed ĝi serioziĝis kaj nun estas plenvalida varianto de nia grupo.

M: Estas iom stranga afero, almenaŭ laŭ mi, ke ni renkontas novan publikon per la akustika muziko. Ankaŭ ĉar multaj el la kantaĵoj estas akustikaj versioj de la elektra repertuaro. Kaj mi havas la senton, ke oni devus koni la originalon por ĝui la akustikan version.

R: En la montpeliera UK vi havis tre grandan akustikan koncerton, verŝajne estis la plej granda publiko, kiun vi iam havis. Kia estis la koncerto?

B: Ni estis terure nervozaj antaŭe, ĝuste pro la grandeco. Estis la unua granda prezento de akustika varianto.

M: Laŭ mia memoro post unu kantaĵo subite ekfunkciis la afero. Estis bonega kontakto kun la publiko kaj mi havis la impreson, ke aŭdeblis ĉiu vorto kaj tio estas tre malofta afero kiam oni ludas elektre... ke oni povis fakte kompreni, kion ni kantas.

R: Kiom bone vi kutime vidas kaj spertas la publikon kaj la reagojn en publiko dum koncerto?

M: La problemo estas ofte, ke oni havas lumĵetilojn en la vizaĝo kaj oni vidas absolute nenion. Ni ne scias, ĉu estas 10 aŭ 500 personoj.

R: Ĉu vi havas iujn speciale belajn aŭ terurajn memoroj pri viaj koncertoj?

M: La plej terura koncerto estis verŝajne en Bergeno. Ĉar simple la publiko tute ne interesiĝis pri ni.

B: Ili sidis kiel statuoj, senmovaj, sen fari eĉ unu mienon. Estis terure. Ni suferegis, estis koŝmaro.

Kiel la plej belan memoron la bandanoj mencias sian koncerton en IJK en Sankta Peterburgo en 1995. Post grandaj teknikaj problemoj la koncerto finfine povis realiĝi. Mankis scenejo, sed eblis bona kontakto kun la publiko de sur planko.

R: Kaj kiam aperos akustika K-disko?

M: Demandu al Flo! (Rido)

B: Ni multe parolas pri tio. Ni ĵus registris elektran diskon kun unu akustika peco. Kaj ni vere volas fari tion, plenan diskon akustikan. Estas nura afero pri mono. Se mono aperus, ni morgaŭ enirus studion.

R: Kiel nomiĝas via ĵus registrita disko?

M: "Sed estas ne".

R: Mi havas la impreson, ke vi dum jaroj iom moliĝis. Kia estas via nova disko?

M: Moliĝis? Ĉu?

B: Ni malmoliĝis.

M: Estas iom interesa paralela evoluo. La kantaĵoj iĝis eble pli melodiecaj, pli facile alireblaj, sed la sonbildo samtempe plipeziĝis.

R: Pri viaj tekstoj oni multe parolas. Mi sci-volus, kiel ili naskiĝas.

M: Mi plej ofte unue faras la muzikon kaj poste mi pripensas, kiun etoson oni volas havi en la teksto.

B: Ofte teksto verkas sin mem post bona ideo.

R: Ĉu ekster rokliriko vi verkas?

M: Mi verkis du artikolojn pri arkitekturo, sed en la sveda kaj en la angla. (Rido)

R: Kiom da koncertoj vi kutime havas ĉiujare?

B: Tre varias. Pasintjare ni tute ne koncertis, ĉi-jaro estas rekorda jaro.

M: Estas la kvina ĉi-jare.

R: Kiom ofte vi ekzercas kune?

M: Malofte, nur kelkfoje antaŭ koncerto. La problemo estas, ke ni ne havas provludejon. Kaj tial ni ne povas regule provludi.

R: Kiel estas en la esperanta mondo: Ĉu vi jam spertis la kutimajn muzikmondajn fenomenojn en Esperantujo, ekzemple ke oni petas de vi aŭtografojn, svenas en viaj koncertoj, volas kontaktiĝi kun vi nur ĉar vi estas famuloj?

B: Estas iomete tiel, oni ne svenis ankoraŭ laŭ mia scio, sed aŭtografojn oni petas.

Post la intervjuo Persone ricevis novan inviton por koncerti en Finnlando, dum la unua finna KEF en 2000.

*Intervjuis Riitta Hämäläinen*

## FEJOn Adventa Festo 29.11.1998

Nuorten esperantistien tämänvuotiset pikkujou-lut pidettiin Kallion nuorisoasiainkeskuksessa. Tilaisuus jakautui karkeasti ottaen kahteen osaan. Aluksi n. 50 paikalle saapunutta asianharrastajaa saivat harvinaista herkkua kuultavakseen. Naapurimaastamme Ruotsista oli saapunut jo pitkään esperantorockin kiistattomana kiintotähtenä pidetty akustinen trio, Persone. Puolitoistatuntinen setti oli vaihtelevuudessaan mielenkiintoista kuultavaa ja hämärsi parhaansa mukaan entisestäänkin epäselviä musiikkityylien välisiä rajoja.

Muusikoiden poistuttua estradilta, illan juontajina toimineet Tiina Oittinen ja Anna Ritamäki johdattivat läsnäolijat muutaman yksinkertaisen seuraleikin avulla esperanton alkeisiin. Yleisön harjoiteltua riittävästi kättelyitä, nyökyttelyjä sekä edellisten kanssa synkronoituja suullisia tervehdyksiä esperantohengessä, kutsuttiin paikalle pikkujoulupukki. Pukki jakoi ensin kaikille tutuksitulleet Kalevalapaidat kiitoksiksi yhtyeen jäsenille. Sitten kiitettiin illan tarjonnasta vastaavia kukkatervehdyksin ja vasta lopuksi juhlayleisö päästettiin penkomaan (tullessaan itse täyttämänsä) lahjareppua. Seremonioiden jälkeen olikin aika siirtyä lämpimällä glögillä ryyditettyyn ruokapöytään, jonka antimet näyttelivät elintärkeän energiavarannon roolia erityisesti tilaisuuden jälkeiseen Kiasma-ekskursioon osallistuneille...vaikka kyllä ne junassa-istujaakin tolpillaan pitivät.

Suuret kiitokset järjestäjille antoisasta ja lämminhenkisestä tilaisuudesta!

*Raportis Mikko Erkinaro*

Palautusosoite: Esperantoliitto  
Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki



## **Vintraj Tagoj de EAF**

20.-21.3.1999 en Tampere

Loko:

**Hotelo Ramada**

*(konata antaŭe sub la nomo Rantasipi),  
kie okazis ekz. la Vintraj Tagoj en 1995.*

**Adreso: Yliopistonkatu 44.**

### **Programo**

#### **Sabate 20.3.**

11-12 Eventuala estrarkunsido de EAF  
11-12 Ebleco viziti Neston  
12-13 Lunĉo  
13-15 Malfermo kaj hejmregiona programo  
15-15.30 Kafo  
15.30-16 EAF informas  
16-16.30 ELFI estrarkunsido  
16.30-18 ELFI jarkunveno  
16-17 Rezervo por FEJO  
18-19 Rezervo por KELF  
16-19 Video-, diapozitiv- aŭ filmprezentoj  
19-21 Komuna vespero kun varia programo

**Aliĝilo kun kotizoj kaj prezoj  
sur paĝoj 13-14.**

#### **Dimanĉe 21.3.**

9-9.30 Matenpreĝo  
9.30-10 Kontrolado de rajtigiloj  
10-12 Jarkunveno de EAF  
12-13 Lunĉo  
13-14.30 Laŭbezona daŭro de la  
jarkunveno, poste aŭkcio  
14.30 Fermo kun adiaŭa kafo  
15-16 Ebleco viziti Neston

#### **Planataj estas krome**

- ◆ Informoj pri la 84-a UK en Berlino kaj pri aŭtobusa karavano tien.
- ◆ Prezento de multimedia verko pri Esperanto.
- ◆ Ekspozicieto de ekslibrisoj i.a. de esperantistoj.

### **Seuraava numero ♦ Venonta Numero**

Seuraava numero ilmestyy helmikuun alussa 1999. Jutut 15.1.99 mennessä Aimo Rantaselle, PL 2, 40801 Vaajakoski, puh. (014) 261 438. Venonta numero aperos en la komenco de februaro 1999, artikoloj ĝis 15.11.99 al Aimo Rantanen, PL 2, FIN-40801 Vaajakoski, tel. (014) 261 438.